

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ CESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

T. G. MASARYK:

POLITIKA ANTROPOMORFISMO.

La prezidanto de ĉs. respubliko en intervjuo kun redaktoro de »Prager Presse« esprimis jenan opinion pri la fundamentaj problemoj de la rusa bolŝevismo:

En Moskvo brilas sur videbla loko la frazo, ke la religio estas morfino por la popolo. Ĝi estas alia vorto por prijuĝo de religio, kiun al la Rusoj prezentis Bakunin, nomante eklezion ĉiela brandvendejo kaj brandvendejon ĉiela eklezio. Bakunin popularigis la teorion de Feuerbach, kaj Feuerbach kontraŭe formulis kaj parte kompletigis tion, kion jam antaŭ li faris malnovaj filozofoj, klarigante, ke la religioj havis sian devenon en antropomorfismo, nome, ke la homoj prezentas al si la diojn en formo de homoj, laŭ sia propra, sekve homa, eventuale nehoma (maldefikata, kruda, brutala) natureco. Por la bolŝevistoj resumis ĉi tiun doktrinon Bucharin en sia alfabeto de bolŝevismo.

Mi ne tuŝos la filozofian analizon de la problemo. Jen estas la plej ĉefa problemo de la nova epoko, ligita al la nomoj de Kant kaj Hume, nome ĉu kaj kigrade la homo povas kaj rajtas formi ideojn kaj opiniojn pri tio, kio kuŝas ekstere de liaj sencoj kaj spertoj. Nature jen temas ne nur pri la religiaj konceptoj.

La tiel nomatan antropomorfismon ni trovas ne nur en fako de perceptoj religiaj, sed ankaŭ politikaj kaj socialaj. Eble mi povas la aferon, pri kiu oni temas, klarigi plej simple per la konata anekdoto: Vilaĝaj knaboj diskutis pri tio, kion farus ĉiu el ili, se ili estus reĝo. Miĥalo, filo de vilaĝestro, solvis la polemikon per la kategoria deklaro, ke li dum tuta tago starus sur sterkamaso kaj krakus per vipo. Tio estas: Miĥalo prezentas al si la socialan idealon laŭ sia anima horizonto kaj morala kvalito. Grandan ekzemplon de tiu miĥalajo, de la politika antropomorfismo prezentas la rusa bolŝevismo: La nekonata, per spertoj ne elprovida komunista idealo de socia

organizo estis per praktiko puŝita al la nivelo de neklera rusa »muĵik«. Cetere ni ne bezonas serĉi la ekzemplojn de la politika kaj sociala antropomorfismo en Rusio — ni havas ilin hejme antaŭ la okuloj.

La problemo de socialismo, la problemo de la sociala programo entute, estas, kiel forigi ĉi tiun miĥalajon.

La germana sociala demokratio en sia ĵus akceptita Görlitz-a programo akcentas tre energie la akiraĵojn de la homa kulturo kontraŭ la ebla malprogreso. La homa kulturo — tio estas la plej perfektaj sciencaj kaj filozofiaj rezultatoj, la artistaj kaj moralecaj valoroj kaj al ili respondanta idealo de socialaj aranĝoj; la homa kulturo estas superindividua frukto de la komuna penado de ĉiuj nacioj kaj de iliaj plej bonaj homoj, frukto heredata de unu generacio al la alia.

Sekve, se oni volas krei la idealan staton de estonta socio, respondanta al tiu dezirata homa kulturo, ne al la opinioj kaj inklinoj de iu Miĥalo, tiu ĉi idealo kaj ĝiaj diversaj elementoj devas esti ĉerpataj el la spertoj de ĉiuj epokoj; tio signifas, ke la idealo de la estonta socio devas esti projektata kaj efektivigata de homoj starantaj sur la pinto de la homa kulturo.

Marx tute ĝuste kaj rajte akcentadis la bezonon de la scienca socialismo kaj tial li dediĉis sin tiel diligente al la studo de historio kaj de evoluo ekonomia kaj sociala. Post Marx estis la problemoj de la sociala reformo ĉiam kaj ĉie denove studataj; la mondmilito donis okazon al la rusaj marxistoj efektivigi iliajn idealojn, pri kiuj ili kredis, ke ili estas pure marksismaj. La eksperimento malsukcesis kaj ne povas sukcesi, ĉar la rusaj bolŝevistoj, mallonge dirite, ne staras sur la pinto de la homa kulturo — ili submetiĝis al sia kruda antropomorfismo.

Estas neeble en unusola intervjuo elĉerpi la tutan problemon de la politika antropomorfismo. La moderna pensado, la pensado post la franca revolucio estas substance sociala kaj historia. La mondmilito kaj la revo-

lucio ankoraŭ plifortigis tiun socialan kaj historian pensadon. Tiu ĉi pensado koncentriĝas kaj kulminacias en kreado de la sociala idealo, de la ideala aranĝo de la estonta socio. Temas pri tio, ke la projektado de la sociala idealo efektive troviĝu sur la pinto de la sociala kaj historia scienco kaj filozofio, kaj sur la morala pinto de la homa kulturo. Science dirite, temas pri tio, konstrui la kritikon de la sociala kaj historia pensado; la vorto kritiko nature jen estas prenita en la senco de kompletigo al la »Kritiko de la pura prudento« de Kant. Praktike — politike — temas pri starigo de nova, moderna aŭtoritato, kiu plenumas la socialajn reformojn laŭ la ateco de la homa kulturo (la konfliktojn de monarkismo kaj republikanismo, de parlamentarismo kontraŭ la sovjetoj, rajto de revolucio kontraŭ legitimismo ktp.).

La regulojn de regado de la vilaĝa Miŝalo oni povus sociologie komentarii ankoraŭ pli precize. La primitiva homo ne estas demokrata sed monarkisma, aŭ pli precize dirite, absolutisma. Lia estonteca idealo de vipkrado ne devenas sole el lia malŝato de laboro, sed ankaŭ el liaj absolutismaj inklinoj uzi la vipon ne nur por bati ĉevalojn, sed eĉ por bati liajn »kunmiŝalojn« . . .

ALIGU AL Ĉ. A. E.!!

FELIETONO

B. TITTL:

MEMOROJ EL LA DUMMILITA TEMPO.

(Daŭrigo.)

En la maron de l' estinteco falis semajno post semajno, monato post monato kaj jaro post jaro. Nia ekonomia situacio de longe estis ne elportebla. Ni ne plu vivis, sed nur vegetis. La malsato estis nia daŭra gasto kaj multajn, tre multajn malriĉulojn ĝi kondukis al tombejo. Politike ni tute ne vivis depost la komenco de la milito kaj ŝajnis, ke nia nacio kuŝiĝas en tombon. Ĉesis gajaj kantoj de nia junularo kaj eĉ sur la stratoj oni parolis nur duonlaŭte. Niaj famaj politikistoj Kramář kaj Rašín estis kondamnitaj al morto kaj multaj aliaj estis en malliberejoj kaj internigejoj. Ĉie estis atmosfero, kiu ŝajnis nin sufoki. Kvankam ni ne volis perdi la esperon, ke venos tempo pli feliĉa, tamen kvazaŭ kontraŭvole venadis la demando: Kio estos kun nia nacio?

En tiu premiga tempo, ĝi estis komence de la jaro 1917, mi venis en unu vilaĝan gastejon en la distrikto de Praha. En la ĉambro mi estis tute sola kaj mia kapo estis plena de pensoj ne gajaj. Subite mi ekaŭdis melodion de lulkanto venantan el la apuda ĉambro, kie patrino lulis sian infaneton. Kaj eĉ al miaj oreloj mi ne volis kredi, ke la kanto kiu sekvis, estas nia nacia himno, kiun de la komenco de la milito mi neniam aŭdis. Mole kaj kvazaŭ dolore sonis la melodio de tiu ĉi nia kanto:

ĈEĤOSLOVAKIO.

Pola — Ĉeĥoslovaka interkonsento estis subskribita en Praha la 6. nov. de la pola ministro por aferoj eksterlandaj K. Skirmunt kaj de la ĉeĥosl. ĉefministro dro E. Beneš. Tiun ĉi faktan ĝoje komentarias ĉiuj ĉs. jurnalaj kun la deziro, ke de nun ekregu sincera frata sento inter ambaŭ slavaj nacioj, dum jarcentoj egale suferintaj kaj nun vekigantaj al nova vivo. Ministro Skirmunt antaŭ sia forveturo el Praha akceptis jurnalistojn de Praha kaj esprimis antaŭ ili la esperon, ke iamaj malpacigoj inter la ĉeĥosl. kaj poloj neniam plu revenos kaj ke la amika kunvivo inter la du nacioj forte helpos rekonstrui ilian bonstaton.

La plej bona slovaka verkisto kaj poeto **Hviezdoslav** (familia nomo Pavel Országh) mortis la 8. nov. en Horní Kubín, kie li loĝis de la jaro 1899. Li naskiĝis 2. feb. 1849 en Horní Kubín kaj lia literatura verkado datiĝas de j. 1868. Liaj verkoj estas tre nombraj kaj rilatas ĉefe la vivon de la slovakoj, por kies kultura kaj politika leviĝo li ĉiam energie batalis. Li estis enterigita je ŝtataj kostoj en Dolní Kubín en ĉeesto de ministro Šrobár (nacia kulturo), de prezidanto de ĉs. parlamento Fr. Tomášek kaj de reprezentanto de la prezidanto de la respubliko.

Unua mobilizo de ĉs. armeo, kiu okazis post alveno de »ekskajzro« Karlo Habsburk en Hungarion montris la disciplinon de ĉs. soldatoj tigrade, ke ĝi vekis admiron. Prezidanto de la respubliko esprimis pri tio sian kontentecon en la armea ordono. Demobilizo okazas de la 10. — 30. nov. Ĉie en Ĉeĥoslovakio aŭdiĝas deziro, ke nova mobilizo ne plu estu necesa kaj ke en la Centra Eŭropo ekregu fine daŭra paco kaj harmonio.

Kie la hejm', la mia hejm'?
Tra herbejoj akvo fluas,
Sur la montoj arboj bruas,
Gardenon beligas flor',
Jen paradiz' de la kor'.
Ĝi estas la lando bela,
Bohemio, mia hejm'!

Kie la hejm', la mia hejm'?
Jen vivas en land' floranta
Homo vige laboranta
Kun bonaj kor' kaj anim',
Kun spirito sen la tim'.
Ĝi estas la ĉeĥa gento,
Inter Ĉeĥoj mia hejm'!

La lastaj vortoj de la kanto sonis neesprimeble dolore ĝis fine la kantistino ekploris. Post nelonge ŝi eniris en la gasteĉambro, ŝi estis la gastejmastrino. En ŝiaj okuloj mi ankoraŭ vidis larmojn kaj ankaŭ miaj okuloj estis malsekaj. Eble ni ambaŭ sentis, ke en nia patrujo ni fariĝis fremduloj . . .

Nova kaj firma espero enfalis en niajn animojn, kiam Usono komencis lokumi siajn armeojn sur la okcidenta bataalkampo kaj kiam ni eksciis, ke la amerikaj soldatoj batalas kun admirinda heroeco. Kaj kiam estis al ni konata la efiko de iliaj »tankoj«, ni jam kun plena certeco sciis, ke la monda luktado finos por ni feliĉe.

Kaj tiam ankaŭ la Habsburkoj ekkomprenis, ke la rezultato estos alia ol ili esperis kaj ke estas ne eble regi plu absolutisme. Ili decidigis kunvoki la aŭstrian parlamenton. (Fino.)

ESPERANTISMO

UNU SEMAJNO EN ESPERANTUJO !

Fakaj kunsidoj: Marde la 2an de aŭgusto okazis 32 fakaj kunsidoj en lernejo ĉe St. Vojtěch kaj ĉiu kongresano povis viziti tiun kunvenon, kiu lin interesis. — En komerca kunveno ĉeestis ĉirkaŭ 70 personoj; kunsidon malfermis s-o D-ro Unger (Zürich), parolante pri la movado, prezidis s-oj: Kreuz (Frankfurt) kaj Tell (Stockholm). S-o Kreuz komencis traktadon, bazitan sur la demando, kiamaniere ni povas sukcesigi nian movadon inter komercistaro. — Fruktodona kampo por ni estas Foiroj, kie preskaŭ ĉie estas esp. uzata. Li laŭdas ĉs. samideanojn, ke ili sukcesis aranĝi tiel grandiozan kongreson, diras, ke inter ĉs. esperantistoj ekzistas perfektaj esperantistoj, sed bedaŭrinde en urbo de XIII. ne ekzistas komercejoj, kie oni parolas esperante. S-o Kavan (Plzeň) salutas ĉiujn partoprenantojn, kiuj venis nian liberigitan respublikon. Por sukcesi, li rekomendas, ke esperantistoj-komercistoj skribu siajn mendojn sole esperante (sube oni notu, ke la letero estas mendaĵo, en alta nacia lingvo ekz. germane). Se komercistaro vidos profiton en Esperanto, ĝi certe ĝin lernos. Esperanto povas esti helpilo sed sole al grandkomercistoj; detala komercistaro ne disponeblas per libera tempo, ne lernas lingvon, kiun ĝiaj aĉetantoj ne parolas (krom kelkaj idealistoj). Kun diversaj proponoj kaj konsiloj sin eniĝis s-o Kreuz, prezidanto, poste s-oj: Tell, J. G. Notra (Barcelona), J. Apflebaum (Liverpool), S. Koch (Praha), Saggioli (Padova), D-ro Unger kaj multaj aliaj. Prodiskutitaj estis kaj rekomenditaj: Enkonduko de Esp. en komercajn lernejojn, starigo de grandaj societoj, kie estus edukataj esperantistoj. Al ĉiuj firmoj, kiuj sendis siajn reprezentantojn oni esprimas dankon. La akceptita rezolucio esprimas kontenton pri la ĝisnuna sukceso, decidis studi ĉiujn esperantajn demandojn kaj por tiu tasko elektas komisionon konsistantan el s-oj: D-ro Unger (Zürich), Tell (Stockholm), Kreuz (Frankfurt), Notra (Barcelona), kaj Saggioli (Padova). Post la 3^{1/2} hora diskutado estis la interesa kunveno finita.

—a—.

Sennacieca asocio tutmonda. El la fakaj kunvenoj okazintaj dum la XIIIa, tiu de la S.A.T.anoj estis nekontesteble la plej bone vizitata. Dum tri longdaŭraj kunsidoj estiĝis viglaj, iafaje bruaj diskutoj, kiuj montris kiom da intereso la ĉeestantoj havis en la afero. Estas por ni neeble raportiti detale pri tiuj diskutoj. Ni povas nur enpresi la rezolucion, unuanime voĉdonitan fine de la lasta kunsido. Interesuloj povos legi la tutan protokolon en la oktobra n-o de »Sennacieca revuo« (eks. »Esperantista laboristo«) adreso: 23, rue Boyer, Paris. — Rezolucio. I. Konsiderante, unuflanke, a) ke nur per faktoj ni sukcesos vekii veran intereson pri Esperanto ĉe niaj klasbatalaj organizaĵoj; b) ke la sperto jam montris ke U. E. A. estas la sola organizaĵo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona; c) sed ke ĝia politika neutraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletaria kampo. II. Konsiderante duaflanke, a) ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizaĵoj; b) ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis

nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de Esperanto, ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj, arigu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizaĵoj arigu en unu solan Asocion, por montri al la proletario, per imponaj faktoj, kiom utiliga estas Esperanto por la batafo kontraŭ la kapitalista sistemo. III. Konsiderante triaflanke, a) ke la kunlaborado kun la t. n. burĝaj esperantistoj povas, per tia kompromiso, nur malutili al nia propagando; b) ke jam multaj faktoj montras klare, ke niaj klasaj kontraŭuloj tute ne deziras ke Esperanto disvastiĝu en niaj proletariaj randoj. Pro la ĉi-supre diritaj motivoj, la la kongreso de S.A.T. konfesas, ke oni devas profiti je la sperto jam farita ĉe la neŭtrala Asocio U.E.A.; deklaras ke nur je teknika vidpunkto nia Asocio povas kontakti kun la aliaj esperantistaj Asocioj; petegas ĉiujn klaskonsciaj batalantojn, ke ili dediĉu sian tutan energion al la kreskado de la unua klasbatala Asocio Tutmonda; sendas al ĉiuj esperantistaj proletarioj sian elkoran saluton, kaj petas, ke ili aniĝu la Asocion, por ke per komuna, frata kaj sindonema kunlaborado ni metu kiel eble plej rapide en la manojn de ĉiuj proletarioj la ilon, kiu permesos al ili la forrenversiĝon de la lingvaj baroj.

Skolta kunveno. La 2-an aŭgusto 1921 estis kunvokita skolta kunsido en lernejon de St. Adalberto, komencota je la 10-a antaŭtagmeze. Prezidis ĝin ano de skolta ĉeftendaro, prof. St. Stejskal. La kunsido daŭris ĝis 12^{1/4} kaj sukcesis bone. Diversnaciaj skoltoj rakontis pri sialanda skolta movado kaj prof. Stejskal donis kelkajn klarigojn pri reprezentado de ĉeĥoslovakaj skoltoj en Skolta Esperantista Ligo (S. E. L-o.). So. Th. Čejka el Bystřice pod Host. promesis akcepti almenaŭ provizore agentan funkcion. Kortsiga estis la sceno, kiam prof. Stejskal — prezentante fraton Čejka al fremdaj skoltoj — klarigis al ili, kiel grandajn oferojn kaj same grandajn monperdojn alportis nia preskau unua pioniro de interbohema esperantismo. Frato Čejka — rememorigita per liaj vortoj je tiama bedaŭrindaj spertoj pri malhonesteco de multaj samnaciaj, kiuj ne paginte la de li menditajn lernolibrojn kaj vortarojn, enmizerigadis ofte la malriĉan entuziasmoplenan instruiston, kiu tiam montris jam vere skoltajn ecojn — ne povis deteni sin de larmoj kaj ne kapablis tiusekve eĉ paroladi. La kunsido, kiun partoprenis krom nialandaj geskoltoj ankaŭ fratoj el Danujo, Anglujo kaj 1 el Sudafriko, finiĝis per komuna fotografado sur insulo Žofín. La sekvanta tagon faris skolto Zdeněk Bár, studento de reala gimnazio en Stramberk, sukcese fakan interpretistan ekzamenon ĉe prof. Stejskal pri sciado de esperanto. Vaso.

Ruslandaj poŝtistoj dissendas al siaj alianciaj kolegoj »malfermitan leteron«, per kiu ili anoncas, ke la membroj de la Poŝtista ligo ruslanda deziras ekligi rilatojn kun fremdlandaj kolegoj. Tial ili decidis lerni esp., kio okazas jam en 45 kursoj kaj en la Elektroteknika instituto por poŝtistoj, kie esp. estas instruata kiel deviga fako. La Ligo havas pli ol 185.000 membrojn. La poŝtistoj, kiuj deziras rilatiĝi kun la ruslandaj kolegoj skribu al: Esperantista oficejo ĉe Centra komitato de la la Ligilo, Moskvo, Ĉudovskoj 6., Rusio.

LITERATURO

LA STELO DE SMETANA*).

Bohema rakonto.

Morto! — — — Ĉu tio estis vivo, ĉu la sonĝo? — — —

Ĉio, kio iam doloris kaj turmentis, tiu ĉi sufokiga ĉirkaŭaĵo plena da maldankemo kaj malamo, ĉiuj konfliktoj, pro kiuj tiomfoje sangumis lia koro — ĉiuj tiuj ĉi trompiĝoj kaj ombroj subite malaperis. Ĉio pasis, — jes, — ĉio!

La animo estis klara, plena da lumo, freŝa kiel la blanka floro; en kiu la roso brilas per klaraj radioj.

Li sentis sin tiom feliĉa, tiom neeldireble feliĉa. Kvazaŭ li estus dudekjara, bela kaj juna, li marŝis en sia »ĉamaro«**) vigle kaj gaje tra la floranta printempa herbejo. Sur kia mondo li troviĝas? En kiaj sferoj?

Kaj kio lin plej feliĉigis, estis, ke li denove aŭdis. Ho jes, li aŭdis, li tiel bone aŭdis, kiel neniam sur la tero! Li aŭdis la susuradon de la altkreska herbo, la mallaŭtan muzikon de la ekfloriĝintaj floroj kaj la delikatan arĝentan harmonion, senĉese fluantan tra la azura sfero.

Ankaŭ li ne plu bezonis okulvitrojn, la dikajn vitrojn, tra kiuj li dum jaroj rigardadis, kliniĝinta super siaj admirinde ĉarmaj partituroj, super siaj karaj notoj, en kiujn li enkatenigis la plej belajn kaj la plej dolorigajn revojn de sia harmonia, eterne sonanta animo.

Li demetis la okulvitrojn kaj li denove bone vidis, ho, li vidis ankoraŭ pli klare ol sur la tero ian ĉarman pejzaĝon, sub la ora azuro. Florantan verdan pejzaĝon, arĝente ombrigitan per la ekfloriĝintaj pratempaj arboj kaj trateksitan per la safiro de la harmoniaj fontoj.

Li marŝis gracie, plena da feliĉo, zumetante kanteton tiel belegan, ke ĝi ekmi-regus lian tutan estintan mondon.

Subite li haltis ĉe la alta kaj blanka muro de ia pramalnova ĝardeno. La pordego estis iom malfermita, li do eniris.

Admirindaj pratempaj arboj kun ekfloriĝintaj azuraj kaj blankaj floroj kliniĝis

*) Bedřich Smetana estis fama bohema muzikverkisto (*1824 — † 1884).

**) »Camaro« estas jaketo, surkudrita antaŭe per galono, kian oni portadis en Bohemio en jaroj 1848—49a kaj poste de jaro 1861a.

super la freŝaj herbejoj, prisemitaj per la gemoj de la floroj similaj al la ĉielarko. Nevideblaj birdoj ĉarme kantis en la densa branĉaro. Bonodora bloveto blovis kaj zumis etajn kantojn, kvazaŭ ĉirkaŭe senĉese susurus flugiloj de la anĝeloj.

Ĉu tio estis ĉielo? Ĉu tio estis paradizo?

Subite la maljuna majstro ekaŭdis muzikajn sonojn. Vere, de longe konataj sonoj de kelkaj muzikinstrumentoj kaj la maljuna majstro distingis ĉiujn bone. Tio estis kvarteto.

Allogita per tiu ĉi muziko, la maljuna majstro alproksimiĝis al la laŭra arbo sur la malalta monteto, de kie la muziko aŭdiĝis. Admirinde bela melodio eksonis nun tute proksime de li kaj la maljuna majstro haltigis kiel ensorĉigita post la pratempa laŭra arbo, de kie li bone vidis kvar muzikantojn, klinitajn super la partesoj kaj entuziasme ludantajn belan, nekonatan kompozicion.

Tiu meze sidanta ĉe la malgranda piano de la malnova sistemo simila al miniatura orgeno estis vestita en veston de la plej malnova baroko; lian kapon kovris grandega blanka peruko, belete ondigita, ĵus tia, kiajn oni portis en la jaro 1700a kaj ankoraŭ duonon da centjaro pli malfrue.

La maljuna majstro ekkonas bone, kun ĝojo li ekkonas, ke tio povas esti neniu alia ol Jan Šebastian Bach, vere, neniu alia ol la konata leipziga kantoro, la reĝa korta sinjoro orgenisto kaj orgenisto de »Sankta Tomaso«.

Kaj apud li skuigas la dua, ne pli malgranda kaj ne pli bela peruko de lia najbaro. Tiu ĉi estas simile vestita kiel la fama orgenisto kaj li entuziasme ludas violonon, kvankam oni vidas, ke liaj fingroj ne sufiĉe alkitimiĝis al la tro delikataj kordoj. Li certe pli bele estus sciinta ludi spineton, aŭ ankoraŭ pli bele je orgeno kaj vere plej bele je la grandega orgeno en la katedralo de sankta Paŭlo en la malnova Londono, ĉar kiel nia majstro vidas, li estas Händel mem, la fama kaj bona Händel, la poeto de la sankta harmonio.

Dekstre de li sidas aminda juna viro, vestita en blua baska surtuto kaj surhavana pudritan perukon kun malgranda harplekteto, kian portadis la imperiestro Jozefo. La juna viro de senbarba bela

vizaĝo ridetas kaj delikate ludas flavan fluton. Vere, li ĉarme scias ludi sian instrumenton, oni aŭdas gajajn trilojn, susuron kaj petoladon, kvazaŭ tiuj ĉi forkurantaj tonoj estus nur dolĉaj ŝercaĵetoj.

La maljuna majstro etendis la brakojn. Ho jes, tiu ĉi vizaĝo, tiu ĉi kara belega kapo! Ĉu tio povas esti iu alia ol Mozart — la fama, konata »maestro« Wolfgang Amadeo Mozart, la dolĉa, la ĉarma sorĉisto de la tonoj, kies nur la unusola ĉarma menueto dancigis ĉiujn ŝuojn kaj ŝuetojn de la tuta Eŭropo!

Maldekstre, kontraŭ Mozart sidis la lasta el la muzikantoj, la kontrabasisto. Estante vestita laŭ la malnovmoda »biedermyera« stilo, li surhavis baskan surtuton kaj grandan pintoforman kolumon, kvazaŭ li estus veninta ĉi tien ĵus el la jaro 1830a. Lia hararo estis neordigita, ke ŝajnis, ke li entute ne scias pri la kombilo kaj tirante arĉon trans la kordojn de sia instrumento, li nubigis la frunton, kvankam ĉirkaŭe floras la rozoj. Kaj tiu ĉi muzikanto estis Beethoven.

La maljuna majstro ekkonas lin ankaŭ bone, same bone, kiel li ekkonis liajn tri kunulojn. Tio estis vere van Beethoven, la konata stangulo de la malnova Vieno, genio de belegaj tonoj, la ribelena aglo, revanta en lunaj radioj.

Kiel ensorĉigita aŭskultis la maljuna majstro novan nekonatan muzikon kaj kiam ĝi, kvazaŭ per mil radioj brilanta, en gajega finalo finsonis, nekontraŭstarante li ekaplaŭdis, sincere kaj laŭte ekaplaŭdis ĝis ĉio ĉirkaŭ resonadis.

La muzikantoj leviĝis kaj ridetante iris renkonte nal li. Vere, eĉ la nubigema Beethoven ekheligis la frunton kaj prenante manon de la alveninto, li diris: »Estu bonveninita, kara kamarado, estu bonveninta!«

Ambaŭ sinjoroj en grandaj perukoj riverenciĝis kaj premis sincere lian dekstran manon. Dume Mozart, la plej gaja el ĉiuj, ekfajfis arion el la plej ĉarma opero de la alveninta maljuna majstro, kaj poste, alpaŝante al li amike, ĉirkaŭprenis lin.

»Ni ja de longe vin tie bone konas «mon cher». Ni ofte aplaŭdadis viajn admiridajn melodiojn. Vi estas nia, tute nia, kara reĝa bohema sinjoro kapelestro!«

Kaj Jan Sebastian Bach diris elkore: »Ni estus dankemaj al vi, se vi ion al ni ekludus.«

Händel montris la pianon kaj Beethoven alŝovis la seĝon. »Ion boheman, ion tiom strange malgaje belegan!« diris Mozart, metante manon de la maljuna majstro sur la klaviaturon.

Kaj la maljuna majstro en la griza ĉamaro tute emociigita eksidis ĉe la piano kaj komencis ludi. Li bele ludis, li ludis admirinde, per sia tuta animo, rememorante sian malproksiman malgajan patrujon, kiun li kvazaŭ vidis tra nuboj en malproksimeco, benantan al li per verdaj branĉetoj. Pardonante siajn malamikojn li benis en malproksimecon ĉiujn, kiuj lin komprenis. Li ludis kaj en lia ludo muĝis jen la melankoliaj bohemaj arbaregoj, susuris la gepatraj arbaretoj, strange kaj kortuŝe vibris la dolĉa kanto de la gepatraj kampoj, kvazaŭ blovetus el lia kompozicio de neimagebla malproksimeco la pramalnovaj naciaj legendoj, jen ekmuĝis la arĝenta voĉo de »Moldavio« kaj melankoliaj kantoj de la malnovaj tempoj. Nun eksonis fanfaroj de la estinta gloro de Bohemio kaj tuj, kvazaŭ la ĥoralo — la venko — kantoj de la Dia soldataro. Denove ĝi ekŝaŭmetis, kvazaŭ vino en pokalo, eksonis la gaja kanto de la sakfajfilo kaj la mildaj vilaĝaj kantoj, kiujn oni kantas sub la gepatraj tilioj.

Nia majstro arde kaj ĉarme ludis, rememorante sian karan patrujon, jam ne kun la doloro, sed plena da dankemeco kaj amo, dezirante ĝin eterne beni kaj gardi en lumo de la ĉielaj sferoj... Kaj dume li ludis, enprofundiĝinta en la maron da tonoj, tremetis super li la malnovaj laŭroarboj kaj folio post la folio faladis sur la frunton de Smetana. Kaj kiam finsonis la lasta gajega kaj ĝojega akordo de la improvizado, la kvar genioj de la muziko entuziasme aplaŭdis, premis liajm manojn kaj ĉirkaŭprenis sian kamaradon, dankante al li sincere.

»Ho, kiel vin rekompenci por tio, kiel eminentigi vin, kara reĝa bohema sinjoro kapelestro?« vokis la gracia maĉstro Mozart. »Kie ia laŭro, kie ia ordeno por vi?«

Estis vespero, la ĉielo malheliĝis kaj la grandaj, belegaj steloj brilis malalte super iliaj kapoj.

Baj Beethoven, la plej granda el ĉiuj, jen etendis la brakon supren al la stelo kaj depreninte la plej belan kaj la plej briltantan el ili, ornamis per ĝi la bruston de Smetana. Tio estis la plej eminenta orde-

no el ĉiuj ordenoj. Bach kaj Händel aplaudis. Mozart pro entuziasmo ĉantis.

Sed nia maljuna majstro, depreninte la stelon de sia brusto, jetis ĝin, plena da amo kaj havante la okulojn malsekajn pro larmoj, en malproksimecon, en la profundan azuron de la terspaco.

Kaj la stelo flugis — ĝi flugis profunden kaj pli profunden, ĝis ĝi eklumetis super lia patrujo, super lia belega kaj kara patrujo.

Kaj ĝi lumas, eterne lumas...

Estu benata vi brila, dolĉa lumo! Estu benata, ho stelo de la harmonio kaj kanto!

La stelo de Smetana!

Tradukis Sid. Dlouhá.

DIVERSAĴOJ

Al la laboro! La nuna tempo estas plej konvena por aranĝi kursojn de Esp. kaj por varbi al nia movado novajn adeptojn. Nelabori en la nuna tempo estas peko kontraŭ esperantismo! Amikoj, samideanoj! Se vi ankoraŭ ne komencis, do malfermu kiel eble plej baldaŭ kurson de Esperanto. Se vi bezonas informojn aŭ konsilojn pri aranĝado, turnu vin al nia redakcio, kiu helpos al vi en ĉiu ajn bezono.

Atentigo. En la unuaj tri numeroj de la nuna jarkolekto de nia gazeto ni komencis aperigi en la Felietono memorajojn el la dum milita tempo, sed en la sekvintaj numeroj ni devis ĉesi la enpresadon, ĉar la spacon ni bezonis por la kongresaj aferoj de la XIIIa. Nun fine ni enpresas la daŭrigan kaj la fino aperos en la numero decembra. Tiel ni kontentigas tiujn legantojn enlandajn, kiuj trovis en la enhavo de la Felietono »memento« de la forpasintaj militjaroj, kaj la legantojn alilandajn, kiuj interesiĝas pri niaj dum militaj suferoj kaj zorgoj.

La aranĝado de nia XIV. Kongreso en Helsinki vekas en Finnlando rimarkindan atenton. Dudek finnaj eminentuloj: prezidanto de la parlamento, ministro de instruado, de eksterlandaj aferoj, II. vicprezidanto de la parlamento, parlamentanoj, ambasadoroj k. a. akcentante, ke tiu ĉi kongreso estas la unua internacia kongreso ĝis nun aranĝata en Finnlando, turnas sin per publika alvoko al la publiko kaj akcentante la gravecon de la lingvo internacia admonas la loĝantojn, al kiuj la kongresa komitato eble sin turnos, laŭ forto kaj ebleco helpi ĝin en ĝia respondeca laboro. »Por ke la kongreso faru veran propagandon por nia lando, estas antaŭ ĉio necese, ke la organizo de la kongreso estu unuaklasa. La ekstera ordo estas la plej sentebla pruvo pri la kultura stato de iu lando, kaj impreson pri ĝi eksterlandano ĉiam kunportos.« Tion oni diras en la alvoko kaj el tio oni povas senti, ke la kongresanoj trovas en Finnlando plej varman akcepton. Sekve: ŝparu jam de nun por veturi al la admirinda lando de mil lagoj kaj por subteni la klopodon de niaj finnaj kunfratoj.

Esperanto aŭ Ido? En la Viena gazeto »Volks-zeitung« (28. aŭg.) la reprezentanto de

la loka »Ido-Mondlingo« so dr. Haft invitas esperantistojn al la publika diskuto pri la ambaŭ mondlingvoj. Kiel oni pritraktus la temon estas videbla el ilia propono: Idistoj transdonos al espistoj 200 vortojn de germ. teksto, kiuj rilatos fizikon, biologion, medicinon, filozofion kaj artan kritikon. La esp. traduko estos redonita post ok tagoj. La saman taskon havos la idistoj. Ĉe la diskuta kunveno en iu publika halo en Vieno oni tradukos tekstojn germanlingvajn en esp. kaj reen — kun helpo de vortaroj! La samo rilatas la idistojn. — Efektive, simila diskuto povus efektiviĝi flanke de idistoj sole per helpo de vortaroj, ĉar oni povas dubi, ke en Vieno ekzistas homo, kiu povus en sia kapo precize konservi la amasegon de la idaj reguloj. Al la propono de dro Haft ni aldonas: La sukcesoj, kiujn atingis Esperanto kaj Ido plej bone montras la vojon gvidantan al nia idealo, ĝenerala enkonduko de la lingvo internacia. Esperanto iras de unu sukceso al alia dum Ido nur vegetas. Tiel decidus la praktiko kaj neniu pli aŭ malpli bona diskuto ŝanĝos tiun fakton!

Originala propagando de Esper. Nia malnova samideano prof. T. J. Havelka elpensis originalan propagandon de nia lingvo. Pri tio skribis: »Germana Esperantisto«, januaro 1911: »Köln a. Rh. En la urba artmetia muzeo sro. Havelka elmontris kolekton distingindan per siaj grafikaj laboraĵoj kaj desegnaĵoj. Inter ili troviĝas ankaŭ diversaj esperantaj presajoj.« — Multaj personoj demandis, en kia lingvo estas la tekstoj kaj ricevis germanan flugfolion »Lernet Esperanto!« En tiu ekspozicio frapis nin granda afiŝo kun demando: »Ĉiu Vi parolas esperante?« — Sekvintan jaron havis sro. Havelka artekspozicion en Praha, pri kiu la bohemiaj gazetoj skribis unuanimaj laŭdoj. »Časopis Českých Esperantistů«, januaro 1912 skribas: »En la palaco de artoj »Rudolfinum« en Praha malfermis nia bone konata samideano s-o. Havelka, eksasistanto de la reĝa akademio en Leipzig, ekspozicion de siaj skizoj kaj laboroj e fako de artista presaranĝo, mandeseĝnitaj titolornamoj, afiŝoj kaj reklampresajoj. Abunda kvanto da plej variaj kaj belaspektaj originalaj skribdesegnaĵoj konvinkis la vizitantojn pri alta artisma grado, kiun atingis nia simpatia amiko. Speciale ni kun ĝojo rimarkis serion da esperantaj tekstoj, kiuj samtempe servis kiel bona atentigo pri nia lingvo.« — Jam kiel lernanto de artmetia lernejo en Barmen, skribis nia samideano dum la instruado de artskribo esperantajn tekstojn, kiuj poste estis elmontritaj en la lernejekspozicio. — En la jarlibro de bohemiaj grafikoj (»Almanach grafických příslušníků«) 1909 li skribis artikolon pri artskribo kaj montras sur tabelo diversajn karakterojn de literoj, kie li atentigas je Esperanto boheme, angle kaj per esperanta teksto. La saman kliŝajon li poste bezonis por artikolo pri skribado en bohema ĵurnalo »Český Svět« no. 21, 1912, kie ni ankaŭ trovas la titol-desegnaĵon por la libro »Metafiziko de la seksa amo de Arthur Schopenhauer. Trad. de Rich. Bresch, Leipzig.« kun portreto de la aŭtoro. — En la jaro 1912 ni vidis kelkajn esperantistajn diplomojn desegnitajn de s-ro H. en Dresden en arta ekspozicio. Krom tio lian boheme-polan lernolibron de artskribo, kie estas ankaŭ reklamo por

Esperanto sur kelkaj folioj. Komence de 1914 aperis en Omsk, Siberio, lia rusa lernolibro de artskribo kaj ornamentoj en kiu li enmetis ankaŭ esperantajn tekstojn. Ni esperas, ke nia samlandano s-ro Havelka daŭrigos la komencitan propagandon tiel vigle, kiel antaŭ la mondbatalado.

Kiel nomi tion? S-o Jaro **Železný**, katolika pastro en Plánice ap. Klatovy enpresas en »Dětský svět«, gazeto por katol. infanoj kurson de »Esperantido«. Ni ricevis la unuan kajeron kun tiu ĉi kurso kaj ni kun ekmiro konstatis, ke s-o Železný eĉ ne per unu vorto diras kiun lingvaĵon li tie ĉi propagandas, sed kontraŭe uzas ĉie la nomon de Esperanto, sub kies nomo li ankaŭ enpresigas la rubrikon. En »Esperantský Zpravodaj« plendas f-ino Šupichová, ke la sama s-o kopiis sian lernolibron por eldoni la sian de Esperantido. Sekve li estas ne nur literatura ŝtelisto, sed ankaŭ falsisto kaj trompulo. Estas bedaŭrinde, ke tiu homo en sia hejmo instruas infanojn pri moraleco. Bedaŭrindaj infanoj...

Komitata kunveno de Ĉ. A. E. okazis la 1. nov. en Praha. Ĉar por tiu tempo — kaŭze de la mobilizacio — estis anoncita prokrasto de ĉefaj vagonaroj, ne partoprenis la kunvenon la komitatmembroj el Plzeň. Oni decidis sendi al ni la raporton pri tiu kunveno, bedaŭrinde ĝis la lasta momento antaŭ la apero de tiu ĉi n-o (15. nov.) ni ricevis nenion. Tial la raporto aperos en n-o decembra.

La Ĉs. ministerio por popola provizado estis reprezentata ĉe la XIII. kongreso en Praha per s-o F. J. Havelka, persona sekretario de la ministro. Tiel informas nin s-o H., mirante, ke nenie aperis noto pri tiu ĉi fakto.

Esperantista Klubo en Praha translokiĝis el kafejo Union. Ĝia nova adreso estas: Praha I, Příkopy 1, kafejo Edison. En la dua etaĝo de ĉi tiu kafejo. (angulo de strato Můstek) ĝi havas grandan belan ejon, kie ĝi regule ĉiun vendredon je la 8a horo vespere kunvenas. Ĉiuj samideanoj estas kore invitataj.

»**Sennacieca revuo**«, organo de tutmonda laboristaro (komunista) estas la anstataŭanto de la »Esperantista Laboristo«. Adreso de administracio: S-o L. Glodeau, 177, Rue de Bagnolet, Paris. — Jara abono kostas 25 Kĉ.

Nova gazeto de katolikaj esperantistoj. En Graz (Aŭstrio) komencis aperadi nova katolika gazeto en esp.. Ĝi estas la »Katolika Mondo«, univ. organo por tutmondaj interesoj katolikaj. Ĝia redaktoro estas s-o Dr. M. J. Metzger, Graz, Karmeliter-pl. 5. Abono por 10 n-oj 10 Kĉ.

Esperanto kaj poŝtistoj. En Plzeň komenciĝos (meze de novembro) esp. kurso por poŝtistoj, kiun aranĝos la Popola Universitato. Instruos s-o Tittl. Ĝi estos jam la kvina esp. kurso nuntempe aranĝata en Plzeň: Du kursojn aranĝas soc. dem. laboristoj, unu Esp. klubo, unu germ. komunistoj kaj krom tio estas esp. instruata kiel nedeviga en tri grupoj (en ĉiu grupo estas lernantoj el du klasoj) en la lernejo por komercaj lernantoj.

Printempa specimena foiro de Leipzig okazos 5.—11. de Marto. Interesuloj pri la foiro ricevos en esp. ĉiujn deziratajn informojn kaj belan kaj riĉenhavan esp. prospekton kun ilustraĵoj ĉe la: Messamt für die Mustermessen in Leipzig, Esperantofako.

El familio de la progresanoj. Samideano Alois Zedník, banka prokuristo en Berlin W. kaj sam-

ideanino Sonjo **Žáčková** el Praha festis sian geedziĝon en Praha la 27. okt. t. j. Al ilia komuna vojo tra la Vivo ni esprimas sinceran deziron de vera feliĉo kaj ĉiama kontenteco. — La redakcio.

En la Komerca akademio de Praha estas instruita Ido! Tio okazas en sidejo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista post la XIII. esp. kongreso, kiun ĉeestis s-o Šusta, la ministro por publika instruado.

oooo

Berlin, Dresden, Praha. Ni ne volas respondi al la neĝentilaj raportoj de s-ro Ellersiek pri la XIIIa, publikitaj en la n-ro 8.—9. de »Esperanto Praktiko«. Ni sole rekomendas al ĉiuj legantoj tralegi la gazeton »Belga Esperantisto« n-ro 7.—8. de k. j., paĝoj 109.—111., de kie oni povas ekscii, ke en Germanio dum antaŭkongreso kun nur 800 kongresanoj, ne ĉio plej bone funkciis. — Esp. klubo Plzeň.

oooo

Fred Koch.

Numero 1.

La 20-an de septembro 1921.

Komunikoj de la Praha-a Foiro.

La Administra Konsilantaro de la Praha-a Foiro decidis instali specialan oficejon por Subkarpati Rusujo en Uĝhorod, kiu devas propagandi la Praha-an Foiron laŭ la tieaj cirkonstancoj sub la administro de tiea fakisto.

La ministerio por Eksterlandaj Aferoj alsendis al la Direkcio de la Foiro superrigardajn pri la propagando de la diplomaciaj reprezentadoj de la Ĉeĥoslovaka Respubliko en eksterlando. Ĝi devas esti konstatita, ke la forta vizito de la Foiro el la eksterlando estas inter aliaj ankaŭ dankinda al la subteno flanko de la ĉs. Konsulejoj.

Konsiderante, ke la nombroj pri negocoj faritaj dum la Foiro estas plene nefidindaj, la Foira Direkcio vidis sin devigita, kompili raporton pri la III-a Foiro sen laŭnombra statistiko pri la negocoj.

Sur bazo de interrilato ekkomencita okaze de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en celanta en kunlaboron inter Eŭropaj Foiroj, la Foiro de Padova, per sia letero de la 28-a aŭgusto de la j. k., proponis kunlaboron kaj la administra konsilantaro de la Praha-a Foiro, per sia decido de la 16-a de la monato kuranta, aprobis la proponon.

La kontrakto ampleksas kvin punktojn, per kiuj **Esperanto estas difinita kiel lingvo por la korespondado inter la Foiroj.** Plue estas faritaj interkonsentaĵoj koncerne la reciproka propagando dum la Foiroj, la komerca informo servo, la reciproka subteno de la Foiroj ĉe iliaj registaroj kaj la reciproka gazetara propagando.

♥

Ĉu Vi scias, ke per la venota numero finos la nuna jarkolekto?

Ĉu Vi jam sendis la abonon?

Se ne, sendu ĝin senprokraste, ĉar ankaŭ ni devas pagi la ŝuldojn!

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresko kostas 2 Kč.)

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmarkoj.)

Bratislava (Ĉeĥosl.), Radiostacio: Leŭtn. A. Slavík. Sendu rekom. 20—100 PM de via lando kaj vi ricevos saman nombron ĉeĥ. (PI, GI!)

Antwerpen (Belgio), Stierstr. 7. So A. Swalf, diamantisto, koresp. per I. K. kaj L.

General Arenales F. C. P. (Argentino). So Manuel Noele Güell, supera instruisto, koresp. I. K. kaj L., interŝ. P. M., librojn, ilustr. revuojn k. a. Ĉiam respondos.

Plzeň (Ĉeĥosl.). So Ferd. Votrubeč, vrchní poŝtov. oficiál, deziras interŝanĝi artistajn P. K. kaj L. kun francaj, anglaj, rusaj kaj ekstereŭropaj samideanoj.

Bilovec (Silezio, Ĉeĥosl.) Střelnice 33. So Josef Manuella ĉe so Brosch, per P. K. kaj L.

Bilovec (Silezio, Ĉeĥosl.) Náměstí 11. So Josef Němec, per P. K. kaj L.

Barcelona (Hispanio), Asturias 1. - So Josep Gispert, per P. K. kaj L.

Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo povas aboni

„Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.

La gazeto estas ilustrata. 16 paĝa, kun riĉa kaj interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio. Jara abono 45.— Kč.

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 270 Kč, 100 kusů 24.— Kč.

Via horloĝo funkcios
precize se vi ĝin donos por
rebonigi al

FR. NOVÁK,
horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.



Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4.—, afrankite Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—, afrankite Kč 37.50.

Ĵus aperis 3.— a eldono de
BES-a ADRESARO DE ESPERANTISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ.

Bela praktika manlibreto, 90—pĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. — Prezo 9.— Kč, alilande 150 Fr. sv., pagebla en poŝtm. au respondk. — Eldonis:

BOHEMA ESPERANTO-SERVO,
MORAVANY,

Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

ALIGU AL Ĉ. A. E.!!

**Knihy, jež možno obdržeti
v naší administraci.**

(Při objednávce poštou nutno připočísti poštovné, jímých knih nevedeme.)

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný Kč 7.50
Slovník esperantsko-český, brož. Kč 5.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1918 . Kč 4.50
Časopis »La Progreso«, roč. 1919 Nroj. 5—10 Kč 4.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1920 . Kč 16.—
Tittl: Krátká mluvnice Esp. Kč 0.30
Čejka: Slovník esp.-čespý, brož. Kč 7.80
Čejka: Slovník čes.-esperantský Kč 3.30
Čejka-Krumpholz: Podrobná mluvnice Esperanta Kč 7.30
Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice Esperanta Kč 3.10
Esp. movado en Moravio Kč 4.—
Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. Kč 0.80
Jazyk všeslovanský a Esp. Kč 0.20
»O dvojí pravdě« Kč 14.—
por niaj abonanto. Kč 12.—
Kühnl: Úplná učebnice esperanta: c) celoplátěná vazba Kč 16.40
Kühnl-Procházká: Slovník česko-esper.: b) brožovaný Kč 18.—
Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře Kč 6.—
Sherlock Holmes Kč 4.50
J. S. Machar: Benedek Kč 3.60
Gvidlibro tra Praha Kč 3.60
Výtah z Kotzina: Na obranu esper. Kč 2.40
Co je esperanto Kč —.20
Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo Kč 20.—
E. Privat: Vivo de Zamenhof Kč 48.—
Por kongresaj glumarkoj 100 Kč 10.—
Esp. insignoj »U. E. A.« Kč 8.—
Esp. insignoj malgrandaj pingloj Kč 4.—
Esperanta insigno E. broĉoj Kč 5.—

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.